Vasilij Devjatnin,

# Malhimno idista

En la mond' naskiĝis nova ido,
Tra la mond' malsaĝa iras voko:
Renkontata ĉie per la rido,
Nun de loko flugas ĝi al loko.

Ĝi al glavo, sangon soifanta,
Nun la homan familion tiras:
Al la mond' eterne militanta
Malpaciĝon novan ĝi inspiras!

Sub sensenca sign' de blua stelo
Kolektiĝas kelkaj poliglotoj, –
Kaj neniu scias pri la celo,
Kiun havas tiuj idiotoj!

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj, –
Sed ankoraŭ plifortiĝus baroj,
Se per Ido estus ni kaptitaj.

Sur sensenca ida fundamento,
Komprenante preskaŭ jam nenion,
La popoloj pro la malkonsento
Pereigus homan familion! . . .

. . .

Sed ni kredu: tiu ĉi brutaro
Tre rapide tute malfortiĝos, –
Kaj la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Vasilij Devjatnin *(∗1862 – †1938).*

*Arg-1040-2115 (2014-06-05 00:03:29)*

*Tiu poemo troviĝas ankaŭ en* `http://www.wikilivres.ca/wiki/Malhimno_idista`*. Mi, Manfred Retzlaff, kopiis ĝin el tiu retejo. Pri la aŭtoro vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin`*.*